Emil Rittershaus,

## Vestfalio-kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. Vi gloru Rejnon, la fieran,
Jen en la lando de la vin';
Min, kie oni ercon feran
Elfosas, lulis la patrin'.
Surmonte staras abiar',
Travale iras bovo-ar',
Kaj staras kiel gard-starant'
Kverk-arbo ĉe la korto-rand'.
Jen en lulilo kuŝis mi.
Salutas mi vin, Vestfali'!

2. Ni ne parolas kun vi flate,
ne uzas dolĉajn vortojn ni,
ni ne salutas vin tuj frate,
frat-kison donas ne al vi.
Bonvena estas vi nur, se
atentas vi la ŝajnon ne.
Rigardu rekte al la kor'!
Rekteca estas nia mor'.
Interesiĝas ni ne pri
malvaloraĵ' en Vestfali'!

. . .

Emil Rittershaus,

## Vestfalia kanto

*tradukita de Friedrich Pillath*

1. Vi gloru Rejnon kun fiero
Pro ĝia vinberuja font'-
Sed ni naskiĝis, kie fero
Profunde kuŝas en la mont',
Sur rok' altiĝas abiar',
En val' sin paŝtas la brutar',
Kaj garde staras ĉe la dom'
La kverka arbo kiel hom'.
|: Al vi eksonu nia kant',
Ho vestfalia hejmoland':|

2. Ni ne facile kutimiĝas
Al dolĉaj vortoj, flata dir',
Kaj ne rapide amikiĝas
Kun iu renkontita vir'.
Bonvena estas la fremdul'
Nur kun sincero en okul'.
Parolo rekta al la kor',
Jen estas vestfalia mor'.
|: Al vi eksonu nia kant',
Ho vestfalia hejmoland':|

. . .

3.Kaj niaj inoj kaj knabinoj,
Ne amas ili por plezur',
La ĉarmaj amo-ŝpinistinoj,
Pro ŝerca amorado nur!
Anĝelo pia gardas, ke
Malfideliĝu ili ne.[3]
En ĝoj' fidela kaj dolor'
Ĝis morto restas kara kor'.
Beata estas vi, se vin
Brakumas Vestfalia in'.

4. Vin gardu Dio, tero mia,
Vi lando de l' hero' Armin'!
Ĝis kuŝos mi en tombo ia,
Adoros mia koro vin.[4]
Ho, kara lando Vestfali',
Fortega lando estas vi,
Mortante, vin en lasta hor'
Ankoraŭ benos mia kor'!
Land' inter Rejno kaj Vezer',
Salutas mi vin kun sincer'!

. . .

3. Kaj la knabino vestfalia,
Kun okulsteloj en lazur',
Ne emas al flirtad' pasia
Pro nura distro aŭ plezur'.
De la danĝero la Ĉiel'
Ŝin zorge gardas per anĝel';
En ĝojo kiel en dolor'
Fidela restas ŝia kor'.
|: Al vi eksonu nia kant',
Ho Vestfalia hejmoland':|

4. Vin, „ruĝa tero“, gardu Dio
Dum nia tuta vivovoj',
Plenigas via per harmonio
La bruston kaj je kora ĝoj',
Ho Vestfalio, Dia verk',
Kun fort' egala al la kverk',
Vin benos eĉ en lasta hor'
Varmege nia danka kor'.
|: Al vi eksonu nia kant',
Ho Vestfalia hejmoland':|

. . .

[3] aŭ: De l' rekta voj' foriru ne.
aŭ: Survoje ili falu ne.
[4] Pensad' pri vi ĝojigos min.

*Traduko de la Germana poemo "Westfalenlied" de* Emil Rittershaus *(∗1834-04-03 – †1897-03-08) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2005-10.*

*Arg-329-664 (2012-11-30 09:40:54)*

*Pri la verkinto Emil Rittershaus troviĝas informoj en la interreto sub* ***http://www.westfalenlied.de/westfalenlied3/lied.htm***.

*Traduko de la Germana poemo "Westfalenlied" de* Emil Rittershaus *(∗1834-04-03 – †1897-03-08) en Esperanton de* Friedrich Pillath *(†1932-04.03) en 1920.*

*Arg-329-848 (2010-05-26 15:52:56)*

*Pri la tradukinto Friedrich Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon* ***http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath***.